



**Asociación Universal de Esperanto (UEA)**
Consejo de Derechos Humanos, Foro sobre Cuestiones de las Minorías
Quinto período de sesiones, Ginebra, 27 y 28 de noviembre de 2012

**Señora Presidenta, Señoras y Señores:**
**vamos a leer el texto en esperanto con traducción al español.**

Sinjorino Prezidantino, gesinjoroj,
ni estas Stefano Keller kaj Ĉesko Reale kaj ni reprezentas la tutmondan asocion de Esperanto, lingvo internacia, neŭtrala kaj justa, uzata en la interetna komunikado far civitanoj el pli ol 100 landoj.
**Somos Stefano Keller y Cesco Reale, y representamos a la asociación mundial de Esperanto, un idioma internacional, neutral y justo, utilizado en la comunicación interétnica por ciudadanos de más de cien países.**

Universala Esperanto-Asocio laboras por la defendo de la lingvaj rajtoj de minoritatoj, de indiĝenaj popoloj, por la faciligo de la komunikado inter popoloj subtene al kultura diverseco.
**La Asociación Universal de Esperanto trabaja para la protección de los derechos lingüísticos y de los idiomas minoritarios, para facilitar la comunicación entre los pueblos y para promover la diversidad cultural.**

Pri tio oni parolas en la *Deklaracio pri rajtoj de la personoj apartenantaj al minoritatoj naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj*, same kiel en la artikolo 2 de la *Deklaracio de homaj rajtoj*, kiam oni diras: "sen kia ajn diferencigo laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio (...) aŭ alia stato."
**A este respecto se pronuncian tanto la "Declaración sobre los derechos de las personas pertenecientes a minorías nacionales o étnicas, religiosas y lingüísticas", como el artículo 2 de la Declaración Universal de los Derechos Humanos, cuando dicen: "sin distinción alguna de raza, color, sexo, idioma, religión (...) o cualquier otra condición".**

Hodiaŭ en multaj landoj estas kutima la malaprobo de diskriminacioj seksaj, rasaj, religiaj, kaj aliaj.
**Hoy en día, en muchos países es habitual el desprecio hacia la discriminación sexual, racial y religiosa, entre otras.**

Sed la percepto de la lingvaj diskriminacioj ankoraŭ ne apartenas al la kutima kulturo, ofte oni ne konsideras ilin kiel maljustecon.
**Sin embargo, la percepción de la discriminación lingüística aún no forma parte de la mentalidad habitual que no la identifica como injusticia.**

Ni prezentos nur unu ekzemplon: ofte en laboranoncoj oni petas nur denaskajn parolantojn, eĉ por nelingvaj laboroj. Sed ĉu vi akceptus anoncon nur por blankhaŭtuloj, aŭ nur por viroj ?
**Les daremos sólo un ejemplo: a menudo en anuncios de trabajo se piden sólo hablantes nativos, incluso para trabajos que no están exclusivamente relacionados con las lenguas. Pero Ustedes aceptarían un anuncio sólo para blancos o sólo para hombres ?**

Dankon pro via atento.
**Gracias por su atención.**